GISTO, DEC,2008.
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktis ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj

12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12 12

LEGADO TRE VALORAS.

Rajmond Ŝvarc tiel elegante ĵonglas per prefiksoj, radikoj kaj sufiksoj ke, dum mi legas, mi hontas pro mia plumpa Esperanto kaj venas al konkludo ke niaj karaj samideanoj h
avas karakteron tre tolereman rilate lingvouzon. Eble kuŝas en tio la motivo kial preskaŭ nenio sin manifestas pri miaj babiladoj, por ne ĝeni ĉi modestan redaktoron. – La gelegantoj povas almenaŭ esperi ke, post kiam mi finis la legadon de lia verko, mi espereble sukcesos pli memfide uzi la vastegan provizon de vortoj je nia dispono.
Same, la aŭtoro Steele estas admirinda sur tiu kampo. Ĉiu devus klopodi havigi al si oportunon, ril. tempon kaj ŝancon lertiĝi pere tiaj aŭtoroj.

PENSOJ

Vole ne vole la sinteno de GEA vekas, en siaj anoj, la penson, ke oni devas ne brui favore al nia ideo. BRUI estis la moto de nia estiminda Sanguinetti, ideon kiun mi ĉiam apogis laŭ mia fora sensignikeco, de enarbara loĝanto. Gea-sidejo ja estas tro malgranda por akcepti ĉiujn aktivulojn samtempe. Nun somere, ankaŭ tro varmega por signifoplenaj eventoj kiel la 15ª de Decembro. Ĉijare ĝi okazis en privata loĝejo, laŭ oni sciicis. Jes, aplaŭdindas la iniciato sed tre peze laborigas la organizanto(j)n. Cetere, se GEA ne dissendas skriban invitilon almenaŭ al gesamideanoj fore loĝantaj, la evento ŝajnas esti ne por ĉiu ajn esperantisto. Ĉu mi eraras? – Do mi denove plendas, ke la 15ª/12 festa evento ne okazis en publika ejo por ke ni, inter multaj gastoj, povus Dank'al nia komuna amiko Arno mi havas ŝancon tralegi verkon far Raymond Ŝvarc "brui" laŭ rekomendas nia ĉefa instanco UEA, por altiri la publikan atenton, ke Esperanto vivas kaj aktivas. Pere de bonaj kontaktoj, far gravaj homoj oni havigus al ni la atenton de kelkaj ĵurnalistoj, kiuj farus sian laboron en tiutago kaj horo. Elokventa samideano farus festan paroladon, iuj recitus poezion, manke de E-artistoj.

Laŭ la maniero kiel okazas niaj E-eventoj GEA kaŭzas la impreson ke ĝi celas kaŝi nian lingvon, almenaŭ laŭeble bremsi, pro la devojigo de, ekz., memserva restoracio, ie en la centro de Porto Alegre, facile alirebla. Pri tio mi demandis respondeculojn fari tiajn aranĝojn kaj ili montriĝis interesataj gastigi grupojn.

PROPONO: ĉiu samideano bonvolu voĉdoni, laŭ sia libera opinio, ĉu la aserto pravas, ke festaj E-eventoj prefere devas okazi JES, en publikaj ejoj, NE en NE-publikaj ejoj, pro la motivoj supre menciitaj.- La proponanto atente atendas reagojn kun sinpravigaj argumentoj, prefere dum la plej proksima VK.

NOMO

Bonvenas nomo-proponoj, kun esperantaj signifoj, por mia du-monataĝa nova hundineto, (provizore, LUMA) kiu estis forlasita en najbara korto. Ŝi estas malgrandtipa, laŭ mi, ŝi havas iom da sango de la "kolbaseto-rasa". La antaŭan, Gaja, aŭto mortigis, surstrate dum vesperigxo.

KALIGRAFIA KONKURSO

Por mia E-plantejo oni okkazigis Kaligrafian Konkurson en la dua grado de publika lernejo Felipe Kamarão. Partoprenis ĝin 29 gelernantoj. La premio valoris R$ 100,00, kiun ricevis la lernantino Gisele Wenzel sed, domaĝe ŝi suferis subitan malbonfarton antaŭ ol okazus la transdono de la premio. Kiel tasko la kandidatoj ricevis, por kopii, la esperantan tekston kies titolo estas:

KOŜMARO

Hieraŭ vespere mi bone manĝis, trinkis du glasojn da limonado, fumis unu ĉokoladan cigaron kaj post tio mi kuŝiĝis kaj dormis. Tial ke mi ne havis multan tempon, mi dormis rapide. Dum la dormo mi vidis gravan sonĝon. Mi vojaĝis en la Esperantolando, faris viziton al la ĉefurbo de tiu lalando, promenis kaj vidis belajn domojn. Subite staris antaŭ mi viro tenante em la mano grandan revolveron. Lidiris:

- Levu la manojn! Diru esperantajn vortojn!

Mi volis diri esperantajn vortojn sed ne povis. Mi restis silenta kaj miaj haroj stariĝis. La viro diris:

- Mi estas sekreta kontrolisto de Esperantolando, kiu kontrolas. La personoj, kiuj ne parolas nialandan lingvon estas malbonaj homoj.

- Sed mi estas esperanta homo.

- Mi ne kredas. Kie estas via verda stelo? Kial vi ne portas ĝin?

- Mi aĉetis sed ĝi falis de sur mia vesto.

- Kial vi ne aĉetis novan?

- Mi ne sciis ke...ke...ke...

- Kion signifas ke-ke-ke? Ĝi ne estas esperanta vorto. Mi vidas ke vi estis nebona lernanto, vi dormis aŭ silentis.

- Mi ne...

- Ne neu! Se vi ne dirus nun rapide ĉiujn demanajn vortojn, post unu minuto vi estos mortinta homo!

En tiu momento la vekhorloĝo faris skandalon. Mi tuj levis min kaj kisis la vekhorloĝon. Gesinjoroj, se vi ne volas suferi saman inkubon, lernu rapide la esperantan lingvon kaj ĉiam portu la verdan steleton surbruste!

KRISTNASKO & JARŜANĜO

Reciproke al bondeziroj ricev(it,ot,at)aj, de ĉiuj geamikoj kaj, manke de rara inspiro, al mi plaĉas sendi la rimaron far nekonata poeto:

NOVJARSALUTO

Da prospero granda aro
Kaj da sano plena maro
Vin feliĉa, riĉe riĉa
Igu en la jaro
    Kaj, se tamen mia karo
    Trafos vin malsukcesaro,
    Firma estu, tia restu
    Dum la tuta jaro.
Se vin volas ĉagrenaro
Turmentadi (fia faro),
Ĉiufoje ridu ĝoje
Dum la nova jaro!

Kaj ke al Gisto en 2009 ne manku legantoj kiuj ne nur silente observadas, sen kontriui. Jen unu plia helpa Zagettaĵo al ĉi veterano

INSTRUISTO

- Ĉu ne estas mirinde, ke kolomboj scipovas flugi de Eŭropo al Afriko sen uzi mapon kaj kompason?

Eta lernanto:

- Sed estus ja eĉ pli mirinde, se birdoj kunportus mapon kaj kompason!

FORPELO

Sur bildo, ino alkrias ulon kun valizo enmane: vi, aĉa trompista moŝto, iru al Ínfero! – Ĉu mesaĝo por tiea parencaro via? Li demandas.

ENKETO

Por venonta Gisto mi proponas enfamilian kazon pri knabego 16-jara, kiu volas malvirgigi sin, por senti sin vera viro. Ĉu vi konsentas ke Gisto aperigu tian anekdoton? Manifestiĝu.